**NSiR - Nova Sento in Rete**
**N. 1052 (22/2020)**

Aperiodico della Federazione Esperantista Italiana

Federazione Esperantista Italiana: posta fei@esperanto.it ; internet http://www.esperanto.it
Itala Esperantista Junularo: posta iej@esperanto.it ; internet http://iej.esperanto.it
Via Villoresi, 38 IT-20143 Milano Tel 02 58100857

Mandate i vostri contributi a: Norberto Saletti, notiziario@esperanto.it
indicando nell'oggetto "Per Nova Sento in Rete"
NON RISPONDETE AL MESSAGGIO CON CUI ARRIVA NSiR
I messaggi che arrivano al sistema non vengono gestiti.
Le lettere non firmate non saranno pubblicate.
Tutto il materiale distribuito da NSiR è riproducibile citandone la fonte.

**ISCRIVETEVI ALLA FEDERAZIONE ESPERANTISTA ITALIANA**
http://www.esperanto.it/iscrizione-fei.htm

**LIBRERIA**
http://www.esperanto.it/libri.htm
feilibri@esperanto.it

**INCONTRI ESPERANTISTI IN ITALIA**
Il Congresso Nazionale: http://kongreso.esperanto.it
Il Festival Giovanile di Pasqua: http://iej.esperanto.it/ijf

**IL 5 PER MILLE ALLA FEI**
Indicate il codice fiscale **80095770014** nella vostra dichiarazione dei redditi, realizzeremo grandi progetti!

Indice articoli

- Premio Paul Gubbins .......... 2
- Plantoj kun oficiala Esperanto-nomo .......... 2
- Venu al la virtuala Landa E-o kongreso en Usono .......... 2
- Sub ŝtoneto mi trovis esperanton .......... 3
- IEI invitas .......... 4
- UN75: aveta già risposto all’indagine? .......... 4
- Programskizo por VEKI .......... 5
- Omaĝe al Júlia Sigmond .......... 7
- Pillole di Salvezza 1052: Simone Veil .......... 7

## PREMIO "PAUL GUBBINS"

Okaze de la 40-jara ekzisto de MONATO, kaj por memorigi sian forpasintan ĉefredaktoron Paul Gubbins, la revuo starigis la Premion Paul Gubbins por Nova Ĵurnalisma Talento. Ĉiujare, kaj tiel longe ke restos mono en la fonduso kreita por tiu ĉi celo, estos aljuĝataj ĉefpremio de 250 eŭroj, dua kaj tria premioj de 100 eŭroj kaj sep senpagaj abonoj de MONATO. Jen la kompleta regularo de la konkurso.
https://www.monato.be/nova_talento.php

## PLANTOJ KUN OFICIALA ESPERANTO-NOMO

Pluraj plantoj kreitaj per flaŭra gen-selektado havas oficialan Esperanto-nomon. Inter ili la Esperanto-tulipo, la rara Esperanto-klematito, la Grimpo-rozo Zamenhof (kiu povas atingi altecon de 2,60 m.) kaj la Rozo de la Espero. Kompleta kolekto da E. plantoj troviĝas en la ĝardeno de Interkultura Centro Herzberg (ICH) en Germanio, dank' al la iniciativo kaj prizorgo de Peter Zilvar.

Ni memoru tiurilate ke la Urbestraro de Herzberg/H. antaŭ 14 jaroj unuanime (nome, la registaraj kaj la opoziciaj partioj) decidis oficiale kaj laŭleĝe aldoni al la nomo de la urbo la epiteton „La Esperanto-urbo/Die Esperanto-Stadt". Ek de tiam, ĉiuj strat- kaj turismaj indikiloj en Herzberg havas dulingvan nomon: en la germana kaj en Esperanto. La loka Esperanto-societo ICH posedas unu el la plej grandaj E-bibliotekoj en la mondo, kun multaj miloj da libroj, gazet-kolektoj (ankaŭ el la pionira periodo) kaj broŝuroj. La kolekto de E-verkoj en brajla skribo estas aparte rimarkinda.

G.C. Fighiera

## VENU AL LA VIRTUALA LANDA KONGRESO DE ESPERANTO USONA

La 12an de julio ĝis la 18an, ni kune esploros kiel plibonigi la mondon per la **17 celoj de daŭripova evoluo** kaj la 30 punktoj de la **Internacia Deklaro de Homaj Rajto**j! Ĝuu la 75an datrevenon de la **Unuiĝintan Nacioj** kun ni!

Registru tute **senkoste**! Eĉ se vi volas ĉeesti nur unu kunsidon, vi aliĝu al la kongreso. Por pli da informo, aliĝu senkoste:

https://docs.google.com/forms/d/1hCXSw_cfZYRTBrIM-1awZe9-CVRuWRukTZMLsZlJg5A/edit?usp=sharing

La specialaj gastoj:

**Duncan Charters**, la prezidanto de UEA. **Humphrey Tonkin**, la prezidanto de ESF. **Chuck Smith**, la ĉefa motoro de la Esperanta kurso en Duolingo kaj iama **Esperantisto de la Jaro**.

Ni esploros la kunsidoj pri:

* Kiel **kunlabori** kun aliaj Esperantaj kaj ne-Esperantaj organizoj

* **USEJ**, la Usona Esperantista Junularo

* La agadoj kaj planoj de la estraro

* la **signolingvo** de Usono

* **handikapuloj**, la spertoj de blindulino lernante Esperanton

* **Lokaj grupoj**, la rimedoj kaj helpantoj, kaj kiel gvidi

* **Montrealo** kaj la UK por 2022

* Esperanto en la **prizonoj**

* **AAIE**, la Amerika Asocio de Instruistoj de Esperanto

* Metodoj **propagandi** Esperanton

Kaj post la solemna fermo, ĝuu la **koncerton** kun **Majko Hakanto**!

https://esperanto-usa.org

## SUB ŜTONETO MI TROVIS ESPERANTON




Questo giochino non è più disponibile, ma tra le domande c’era anche questa!

## IEI INVITAS

Mi volonte deziras inviti vin al la partopreno de la reta renkontiĝo okaze de la 90-jara jubileo de Internacia Esperanto-Instituto, la 12-an de septembro 2020 inter la 11.00 kaj 16.00 horoj. La jaro 2020 estas la Jaro de Julia Isbrücker, ŝia 133-a naskiĝdatreveno (22-09-1887) kaj de la 90-jara jubileo de IEI (24-a de majo 1930) kaj la 100-a datreveno de la UK-o en Hago. La 12-an de septembro 2020 ni festas ankaŭ la 125-an naskiĝdatrevenon de Andreo Cseh (12-09-1895).

Bedaŭrinde, pro la koronvirusaj limigoj ni ne povas organizi la feston en la sidejo de Internacia Esperanto-Instituto en Hago (Nederlando), kaj ankaŭ ne ĉiuj niaj amikoj el la tuta mondo povus veni al Hago. Do NI FESTAS RETE!

Ni, la estraranoj de IEI, parolos pri Andreo Cseh, Julia Isbrücker kaj IEI.


Vi estas elkore bonvena! Ĉu vi ŝatus akcepti nian inviton por esti unu el parolantoj/prelegantoj dum la reta festado? Mi esperas, ke vi havos tempon kaj emon partopreni la renkontiĝon la 12-an de septembro 2020.

Jolanta van Holstein

J.W. van Holstein <jonike@kabelfoon.nl>

Sekretario de Internacia Esperanto-Instituto

## UN75: AVETE GIÀ RISPOSTO ALL'INDAGINE?




Rispondete all'inchiesta delle Nazioni Unite, disponibile anche in Esperanto, al seguente link: https://un75.online/?lang=epo

## PROGRAMSKIZO POR VEKI
## LA 53-A VIRTUALA ESPERANTO-KONFERENCO ILEI 2020

**1-a Tago sabate 25-an de julio 2020 je la 15-a horo UTC+2**
**Unua sesio, ĉefplado : Malfermo**
**Inaŭgura malferma parolado** (Mireille Grosjean)
**Inaŭgura prelego pri la konferenca temo** : "Interlingvistiko kaj Universitato: pripensoj el fakula vidpunkto". (prelegonto Prof D-ro Davide Astori)

**Deklamado** (Miguel Fernandez). Verkoj de L. L. Zamenhof, Hector Hodler, Herman Lodewyckx, Miguel Fernandez.
Anstataŭ nacia vespero : **planeda pripenso** (Mireille Grosjean)
**Muzika konkludo, kantado** (Miguel Fernandez)

**1-a Tago sabate 25-an de julio je la 22-a horo UTC+2**
**Dua sesio : Azia tagiĝo**
Japana jogo (Mireille Grosjean)
Faktoj kaj Fantazioj, esprimoj kaj poemoj pri la ***MATENO*** (Mireille Grosjean kaj Aurora Bute)

**2-a Tago dimanĉe 26-an de julio je la 5-a horo UTC+2**
**Unua sesio : Kalifornia sunsubiro Strukturoj kaj Komitato**
Strukturoj (video-instruiloj pri UN, UNESKO, Eŭropo, Esperanto-Movado, k.a.)
Strukturoj de la Ligo (sekcioj, reprezentantoj, kontaktpersonoj)
Strukturo de la informkanaloj de ILEI al la Movado kaj al la ekstero.

**2-a Tago dimanĉe 26-an de julio je la 15-a horo UTC+2**
**Dua sesio : Ĉefplado**
Kunsido de la ILEI-Komitato
Je la 19-a horo : Koncerto de Amira CHUN

**2-a Tago dimanĉe 26-an de julio je la 22-a horo UTC+2**
**Tria sesio : Azia tagiĝo**
Japana jogo.
Naskiĝtago de Esperanto. Programo sekvos.

**3-a Tago Lundo 27-an de julio 2020 5-a horo UTC+2**
**Lingvoj**
Komparo inter du planlingvoj (Mireille Grosjean pri la Rumantsch Grischun kaj Eo)
Pri lingvaj kafejoj (Mireille Grosjean)
aliaj

**4-a Tago Mardo 28-an de julio 2020**
**Esperanto, interlingvistiko en universitatoj.**
Prelegoj de Davide Astori, Nicolau Dols, Ilona Koutny, Viko Manzano Arrondo, Nina Danylyuk, Radojica Petrovic, Renato Corsetti, Ivan Colling, So Jinsu, Federico Gobbo, Philippe Planchon.

**5-a Tago Merkredo 29-an de julio 2020 Tago de la Ligo**
**Unua sesio je la 5-a horo UTC+2 Kalifornia sunsubiro**
**La Ligo kaj ĝia historio**. Filmoj pri antaŭaj eventoj ĉirkaŭ la Ligo, kongresoj de la Ligo.

**Dua sesio je la 15-a horo UTC+2 Ĉefplado**
**La Ligo**
15-a horo : Internacia Pedagogia Revuo.. Debato kun Jozefo Nemeth, Mireille Grosjean k.a.
16-a horo : Juna Amiko. Debato kun Stano Marcek, Mireille Grosjean k.a.
17-a horo : Nova eldono de la Manlibro pri Instruado de Eo. Debato kun Katalin Kovats, Mireille Grosjean.
18-a horo : Esperanto Instruista Trejnado EIT. Debato kun Mireille Grosjean, Katalin Kovats, k.a.

**Tria sesio je 22-a horo UTC+2 Azia Tagiĝo**
**Gastronomia Rondo**
Kun pladoj el Rusio, Armenio, Svislando, k.a.

**6-a Tago ĵaude 30-an de julio Tago de Pedagogio**
**Unua sesio je la 5-a horo UTC+2 Kalifornia sunsubiro**
Filmoj pri pedagogiaj konsideroj kiel stimulado al legado k.a. (Eo-Sumoo ekzemple)
**Dua sesio je la 15-a horo UTC+2 Ĉefplado**
Prelegoj de Ariadna Guttierez, Penny Vos, Dima Shevĉenko, Mireille Grosjean, Renato Corsetti, Monika Molnar.
**Tria sesio je la 22-a horo UTC+2 Azia Tagiĝo**
**Pripensoj pri Hiroshima kaj Nagasaki** 75 jarojn poste. Mireille Grosjean prezentos historian enkondukon. Osioka Taeko prezentos la vivon de Sinjorino Pak el Koreio en Japanio dum la milito. Mireille Grosjean prezentos la devon de instruistoj fari lokon en siaj kursoj por tiaj eventoj kaj por pacedukado.

**7-a Tago vendrede 31-an de julio : AMO-seminario 66 kaj Konkludo**

**Unua sesio je la 5-a horo UTC+2 Kalifornia sunsubiro** (en preparo)

**Dua sesio je la 15-a horo UTC+2 Ĉefplado**
**Instruistoj kiel aktivuloj : AMO 66 : Instruistoj - iliaj roloj, taskoj kaj respondecoj**

15-a horo : Debato kun Katalin Kovats, Monika Molnar, Mireille Grosjean
17-a horo : Debato kun François Hounsounou, Mireille Grosjean k.a..

**Tria sesio je la 22-a horo UTC+2 Azia Tagiĝo**
**Konkludo**
Provos fari bilancon de la semajno : Mireille Grosjean, prezidanto de ILEI

**Artistoj** promesis koncertumi dum VEKI. Devus okazi koncerto fine de ĉiu sesio. La detala programo venos.

## OMAĜE AL JÚLIA SIGMOND




Omaĝe al Júlia Sigmond: Hodiaŭ, la 11-a de julio, estas la naskiĝdatreveno de la ruman-hungara verkistino, redaktorino kaj pupteatra aktorino Júlia Sigmond, forpasinta ĉi-jare, pro la nuntempa pandemio, la 23-an de marto. Ŝia lasta naskiĝdatreveno, pasintjare, estis la 90-a, kaj "90" estas la titolo de la lasta rakontkolekto kiun ŝi publikigis (https://katalogo.uea.org/katalogo.php?inf=9751): ĝin konsistigas mallongaj rakontoj, leteroj, memoroj, pripensoj, kiuj mozaike skizas multfacetan portreton de la Aŭtorino. Kiel eta omaĝo en la tago de ŝia naskiĝdatreveno, en la 11-a tago de julio, en la suba ludlisto disponeblas 11 sonregistritaj rakontoj el "90":https://soundcloud.com/saraspano/sets/julia-sigmond-rakontkolekto-90. Voĉlegis por vi, kaj voĉlegos pliajn dum la venontaj semajnoj, Sara Spanò. Aŭskultu ilin por interkonatiĝi kun Júlia, kun fragmentoj de ŝia vivo, kun ŝiaj pensoj; aŭskultu ilin por vidi la mondon tra la speciala prismo de ŝia verkado.

Originale ĉe https://revuoesperanto.org/Julia_Sigmond

Ankaŭ
ĉe: https://www.facebook.com/universala.esperanto.asocio/posts/10157932815298577

Fernando Maia Jr.

**Universala Esperanto-Asocio |** Vicprezidanto

## PILLOLE DI SALVEZZA 1052: SIMONE VEIL

Il 13 luglio è l'anniversario della nascita (nel 1927) della politica francese di origine ebraica Simone Jacob (1927-2017), conosciuta come Simone Veil dal cognome del marito Antoine Veil it.wikipedia.org/wiki/Simone_Veil.

Europeista, orientata al centro-destra, è nota (oltre per le persecuzioni subite in quanto ebrea, e per le sue lotte per i diritti delle donne) perché è stata la prima donna Presidente del Parlamento Europeo (1979-1982).

Segnalo un aneddoto, riportato dalla rivista in Esperanto "Espero katolika" 1981-10/11, p. 174, di cui traduco la parte essenziale:

- Ha avuto luogo a Rimini (22-29.8.1981) il Meeting Internazionale per l'Amicizia tra i popoli. Vi hanno preso parte circa 150.000 persone di molti Paesi. Anche in relazione al tema di quest'anno (L'Europa dei popoli e delle culture), uno stand è stato messo a disposizione del movimento esperantista cattolico.
- Nel corso di uno degli incontri del Meeting, P. Albino Ciccanti ha domandato alla Presidentessa del Parlamento Europeo, Simone Veil, che cosa ne pensa dell'Esperanto. La risposta è stata: «Difendiamo le culture e le lingue di ciascun popolo. Bilinguismo e plurilinguismo risolvono i problemi della comunicazione tra i popoli».

Alleghiamo la moneta francese da 2 Euro in onore di Simone Veil.

